



SVISA

ESPERANTO - SOCIETO

INFORMAS

1-a eldono

Koresp-adr: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich

Red-Telefono: 01/53 77 13

Aprilo 1991

SES informas: Jam depost certa tempo mankis en SES regula informilo. La estraro serĉis solvon sed tio ne estis facila. Por SER nun montriĝas vojo, kiun la prezidanto prezentis en la ĝenerala kunveno.

La sporada apero la folio SES informas ne sufiĉis por la membroj. Ili sentis sin iamaniere preskaŭ forgesitaj. Tial la Centra Komitato (prezidanto, vicprezidanto, kasisto kaj sekretario) en sia kunsido de la 23-a de februaro 1991 preparolis la aferon. Laŭ la klarigo de la prezidanto neniu estis ĝis nun trovebla, kiu estus pretinta transpreni tiun taskon. Post fonda diskutado la vicprezidanto klarigis sin preta transpreni tiun taskon. Li volas provi ĉu li sukcesos kontentigi la membraron. La prezidanto kore dankis pro tiu preteco. Oni do diskutis pri kelkaj detaloj, konsiderante ankaŭ la kason. Kombinante la eldonon de "LITERATURA FOIRO" kaj "SVISA ESPERANTO-REVUO" ni opinias, ke eble dumonata eldono de "SES INFORMAS" povus sufiĉi. En kazo de bezono pli ampleksa aŭ eĉ plua eldono ne kaŭzus problemon. La dumonata eldonado konformus ankaŭ al la kaso, kion oni ne rajtas forgesi. Precipe la rigora altigo de la afranko devigas al adapto de la situacio. Nia fina decido nun estas, ke "SES informas" aperu sesfoje jare, nome: Januaro/Februaro, marto/aprilo, majo/junio, julio/aŭgusto, septembro/oktobro kaj novembro/decembro. Laŭ nia opinio tia aranĝo estas en la akceptebla kadro. Post kelkmonta eldonado ni ŝatos ricevi la opinion de la membroj. Publikigotajn skribaĵojn oni povas sendi al la supre indikita adreso. Precipe la grupoj estas

petataj sendi siajn programojn, kunvendatojn kaj raportojn. La bona kontakto kun la grupoj estas tre grava punkto, kiun ni intencas flegi. Ĉar "SES informas" devos aperi komence de la konforma monato, nome: Januaro, marto, majo, julio, septembro kaj novembro, ni petas sendi manuskriptojn ĝis meze de la antaŭa monato. -FL-

* * *

Grupaj aranĝoj:

LES/Lucerna Esperanto-Societo:

4.4.91. 20.15 h en restoracio Simplon Habsburgstrasse 16.

"Kongresaj paroladoj de Zamenhof" Andy Künzli.
25.4. 20.15 h "sipveturado sur la Rejno" Franz Brügger.

EKW/Esperantoklubo Wil:

3.4. 20.00 h [merkredo] Restoracio Schweizerhof Untere Bahnhofstrasse 18 [4 minutojn de la stacidomo. "Poezia vespero/Esperantologio".

ESZ/Esperanto-Societo Zürich:

8.4.19.00 h en KARL DER GROSSE apud la Grossmünster. "Esperanto en mia vivo" F. Liechti.

* * *

La estonteco de regula "SES informas":

Vidinte la malfacilan situacion trovi iun, kiu konsentus transpreni tian taskon, mi tuj ekkonis, ke iu nepre devas helpi. Kvankam al mi ne mankas laboroj, mi decidis fari la paŝon al ne konata tereno. Spontanee mi klarigis min preta transpreni la eldonadon de "SES informas". Jam sur la revojaĝo post la kunsido miaj pensoj kruce kaj diagonale moviĝis en mia kapo. La demando ĉu mi havas realan ŝancon alproksimiĝi al la grupoj, pendolis antaŭ miaj okuloj. Serioze mi komencis pri pensi la labormetodon. Estis al mi tre baldaŭ klare, ke sen la grupoj kaj sen skribopretaj membroj estos problemo. Tial la bona kontakto al ĉiuj grupoj en nia lando, kiel ankaŭ al izolaj esperantistoj vere necesas. Nur

tiel la raportado en informilo eblos. Karaj
gesamideanoj helpu nutri la redaktoron per in-
formoj el via grupo kaj el via regiono. Ankaŭ
raportetoj pri interesaj vojaĝspertoj kaj tra-
vivaĵoj estas valoraj kontribuadoj. Vi vidas, ke
ekzistas multaj eblecoj atingi viglan interŝanĝon.
Kune ni tutcerte atingos nian celon.

Ankaŭ komencantoj estu kuraĝigataj partopreni, eĉ
se ili ankoraŭ ne havas sperton en skribado. Mi
volonte helpos modifi tekston se ili tion deziras.
Kaj nun ek al la komuna agado! Koran dankon al
ĉiuj jam antaŭe. -FL-

* * *

La redaktoro de

"SVISA ESPERANTO-SOCIETO INFORMAS" deziras al
ĉiuj membroj belajn kaj agrablajn paskotagojn.

* * *

Okazintaĵo el la tiel nomata "bona malnova tempo.
Leginta en INFORMOJ EL LA URBODOMO ZUERICH, aper-
igita en la TAGBLATT DER STADT ZUERICH.

La respektindaj "kompatemaj" sinjoroj.

La supre menciitaj sinjoroj kun siaj perukoj re-
gis ĉi-lande en la tempo 1798. Kontraŭ siaj "ka-
raj" subuloj ili kutime ne kondukis indulgeme, se
temis pri unu el siaj privilegioj, kiel ekzemple
la ĉasado.

La subuloj, kiuj estis naskitaj al manĝado de
kampo-fruktoj ne nur ne havis la rajton manĝi
ĉasbestan viandon, sed la nobeluloj, kiuj estis
naskitaj al manĝado de ĉasbesta viando, ankaŭ
detruis iliajn grenkampojn piedfrapante per la
ĉasĉevaloj kaj igis siajn hundojn ataki la ko-

kinojn kaj porkojn. Kontraŭ tio la pastoro de la vilaĝo "Pfungen" plendis ĉe la registaro en Zürich.

Tiu agado absolute ne imponis al la ĉas-sinjo-roj de Wülflingen (antaŭloko de la urbo Winterthur). Triope ili spione atendis la pastoron en embusko kaj preskaŭ mortbategis lin.

La registaro nur maleme oportuniĝis kondamni la tri nobelulojn. Kiel punon ili estis devigataj pagi al la pastoro nur 230 ŝilingojn kiel kontentigon kaj 500 ŝilingojn kiel parton al la kuracigaj kostoj, sed la pastoro eĉ ne vidis unu centimon. La juĝeja servisto, kiu ricevis la taskon alporti la monon al la pastoro, estis survoje priŝtelita de tri maskitaj viroj!

(ĉu vere la "bona malnova tempo?)

* * *

Kasista afero:

Laŭ informo de la kasisto pluraj membroj jam pagis la kotizon por la jaro 1991. Ili meritas koran dankon.

Kiu ne jam sendis la kotizon estas ĝentile petata fari tion baldaŭ. Per tio vi faciligas la laboron de la kasisto.

Tutkoran dankon ankaŭ al tiuj membroj, kiuj rondigas la pagon per donaca aldono.

* * *

La venonta "SVISA ESPERANTO-SOCIETO INFORMAS"
APEROS KOMENCE DE MAJO'

-FL-

* * *